

## Magia kvadrato

La vortoj estu legeblaj kaj vertikale kaj horizontale.

	1	2	3	4	5
1					
2					
3					
4					
5					

1. Komencu la enigmon per *komenc*'!
2. Al bela *arbo* sekvu via pens'!
3. Kaj *viglas* nun la *muzikaj*';
4. Ne *ŝlosi* devas pordon vi laŭ sento.
5. Restas ja nun *ĥemia elemeto*.

Solvo el la januara numero

- |                   |           |   |
|-------------------|-----------|---|
| 1. trabo + lano = | laboranto | L |
| 2. trono + maso = | astronomo | A |
| 3. nimfo + roko = | mikrofono | M |
| 4. stopi + mimo = | optimismo | O |
| 5. greno + noti = | nitrogeno | N |
| 6. akuta + vizo = | akuzativo | A |
| 7. bruna + mito = | tamburino | T |
| 8. milda + opio = | olimpiado | O |
| 9. valso + jugo = | jugoslavo | J |

Konontaktu nin!



[Gun.Eb@t-online.de](mailto:Gun.Eb@t-online.de)



+493831 490003



# Stralsundaj frekvencoj

Per Esperanto por

popolkompreniĝo



jaro 2005

marto

## Vintro ho ve

(vortoj de Heinrich Hoffmann von Fallersleben, tradukita de Karl Vanselow)

Vintro ho ve,  
ni petas tre,  
baldaŭ forigu vin,  
ĉar ni malplaĉas ĝin.  
Ne diru ne,  
Rapidu tre!

Desir' ho ve  
doloras tre.  
Sed vin kun rida kor'  
ni vidas iri for.  
Nin tio ne  
ĉagrenas tre.

Ne plu ho ve,  
sed nur ju he  
krios la tuta ter'  
ĉe via malaper'.  
Jes, nur ju he,  
do kuru tre!

## ***Ni rememoras***

Antaŭ 200 jaroj naskiĝis je la 2a de aprilo Hans-Christian Andersen. Li certe estas la plej konata dano kaj siajn 156 fabelojn oni konas sur la tuta tero. Kompreneble tiuj ankaŭ estas traduktiaj en multajn lingvojn de la mondo kaj inter alie ankaŭ en Esperanton. Sed ankaŭ kiel



verkisto de dramoj, poemoj kaj romanoj li estas adorata en Danlando. Al la plej konataj fabeloj apartenas: „La novaj vestaĵoj de la imperiestro“, „La malbela juna anaseto“, „La neŝancebla stano-soldato”



Unu monato post la naskiĝo de Andersen mortis en Weimar unu el la plej elstaraj germanaj poetoj – Friedrich Schiller. Li evoluigis de ribela edukato en la Wirtemberga militakademio al poeto de „Ŝtormo kaj Premo“ kaj fariĝis finfine apud Goethe al elstara reprezentanto de la germana klasiko. Li estas konata kiel verkisto de mondfamaj dramoj kaj baladoj. Sed ankaŭ liaj sciencaj skribaĵoj ekzemple pri la tridekjara milito kaj pri la historio de Nederlando ankoraŭ hodiaŭ apartenas al gravaj verkoj por la posteuloj.

Multaj el liaj citaĵoj fariĝis konataj proverboj en la germana lingvo kaj multaj homoj ne scias, ke tiuj devenas de Schiller, ekzemple: La hakilo en la domo ŝparas la ĉarpentiston.

La elstara komponisto Giuseppe Verdi verkis operojn laŭ la Schiller-aj dramoj „La rabistoj“, „Kabalo kaj amo“ kaj „Don Karlo“. Finfine uzis Ludwig van Beethoven la poemon „Odo al la ĝojo” por sia naŭa sinfonio, kiu hodiaŭ funkcias kiel himno de Eŭropa Unio.



## ***Niaj venontaj aranĝoj***

*(planitaj, sed ŝanĝoj eblas. Bonvolu ĉiam antaŭe informi vin ĉe unu el nia grupo!)*

9. 3. 05, 14.30h

Kunveno en la Scheele-domo en Stralsund

23. 4. 05, tempo ankoraŭ pridiskutenda

Vizito ĉe Fred en Ahrensfelde. Vojaĝo komune per trajno.

5. – 8. 5. 05

Germana Esperanto-Kongreso en Bad König

25. 5. 05, 14.30h

Kunveno ĉe Edeltraut en Prenzlau